Kvar poemoj sen iliaj melodioj

AMOSONĜO

Per mia mano,
Por amoplano,
Ĉe florabundo
De verda grundo
Mi nun konstruas
Kaj plene ĝuas
Kabanon klaran
Kaj solidaran:
La gastolerta,
Aperta pordo
Por la orkestro
De birdohordo,
Kaj la fenestro
Montranta vojon
Unuan fojon
De ŝi tretotan!

Por ŝia ven´ la teron krute kotan
Mi faris nun facila kaj ĝardena
Ĉe freŝa hor´ de juna sun´ matena:
Ho Deino, via sino
Per la ŝpino de l´ destino
Tuj prenu min!
Ho buŝotuŝo,
rozodora gusto
De matura frukto: ŝi!
Ho amo mia,
kaj pasia,
Kaj ebria
nur pri ŝi!

La teron krute kotan nur por ŝia ven´
Mi faris nun la bedo de ĝarden´
Ĉe freŝa sun´ de la maten´.
El densa for´ mi vidas ŝin aperi,
Kaj mia kor´ kuraĝas plu esperi:
Atendas min nun amo vivosolva!
Mi trompas min: ne ŝi, nur blovo solva...

Ho pensu nur: la domo tute pretas,
Kaj via vir´ pri via ven´ poetas!
Ho pensu nur: la domo tute pretas,
Kaj via vir´ solecas kaj vegetas!...

AMOTROVO

Mi trovis ŝin sur strato
Kaj sekvis ŝin per gvato
Okul´:
Mi pensis tuj pri revo,
Pri dono kaj ricevo,
Pri lul´!...
Mi pensis tuj pri devo,
Pri dono kaj ricevo,
Pri lul´!...

Kaj preter la gracia
Mi hastis, sed sen ia
Kalkul´
Ektuŝi sin hazardis
Kaj ŝi al mi petardis:
Krudul´!
Ektuŝi sin hazardis
Kaj ŝi al mi bombardis:
Krudul´!

Kaj tio nin instigis
Ĝis vera sin estigis
Simul´:
Nin prenis sento bola
Kaj amo estis sola
Postul´!...
Nin prenis sento vola
Kaj amo estis sola
Postul´!...

Kaj post monata kvanto
Nin vekas per plorkanto
Etul´!
Ni pensis tuj pri devo,
Pri dono kaj ricevo,
Pri lul´!...
Ni pensis tuj pri revo,
Pri dono kaj ricevo,
Pri lul´!...

EKSTAZO

Ŝi tiel bele sin vestas
Per sonĝo kaj mar´,
Ke ŝia korpo sugestas
Pri tuŝo kaj flar´!...

Ŝi estas nun papilio
Sub klara vual´,
Kovrita per la magio
De roza petal´.

Se ŝin ni tuŝos leĝere

Per fingro de man´,
Ŝi disŝaŭmiĝos mistere
En blovon de van´!...

DOLĈA ILUZIO

Ripoze restas
la papili' sur floro:
nun, kiu estas
el ili papilio,
kaj kiu – florfolio?